

Adorna, Sion, thalamum

Brevier-Himno

Propraj tekstoj laŭ la kalendaro > la 2-an de februaro > Prezento de Jesuo > matena laŭdo

*Adorna, Sion, thalamum,
quæ præstolaris Dominum;
sponsum et sponsam suscipe
vigil fidei lumine.*

*Beate senex, prospera,
promissa comple gaudia
et revelandum gentibus
revela lumen omnibus.*

*Parentes Christum deferunt,
in templo templum offerunt;
legi parere voluit
qui legi nihil debuit.*

*Offer, beata, parvulum,
tuum et Patris unicum;
offer per quem offerimur,
pretium quo redimimur.*

*Procede, virgo regia,
profer Natum cum hostia;
monet omnes ad gaudium
qui venit salus omnium.*

*Iesu, tibi sit gloria,
qui te revelas gentibus,
cum Patre et almo Spiritu,
in sempiterna sæcula.*

Amen.

Por nuptofest' ornamu vin,
ho fianĉin', proksimas Li.
Pretigu vin, Jerusalem',
kaj viglu en la lum' de l' kred'.

Rapide venu, Simeon',
ke plenumiĝu via ĝoj',
proklamu Kriston lum' de l' mond',
kaj glor' de l' gento Izrael'.

Gepatroj Lin, la templon mem,
entemplen portas kun ofer'.
Kaj Li, la Dia leĝdonant',
submetas sin al homa leĝ'.

Alpaŝu, reĝa Virgulin',
kun du kolomboj, turto-par',
la elaĉeton pagu vi
por Li, la prez' de nia sav'.

Do kvazaŭ oferitas Li,
per kiu oferatas ni,
la fil' de l' Virgo, Fil' de Di',
al ni naskita, font' de ĝoj'.

Al Vi, Jesu', nun estu glor',
Vi montras Vin al ĉiu gent',
al Vi, ho Patro, Vi, Spirit',
adoro sama en etern'.

Amen.

latina T: Petrus Abelardus (1079-1142)

E: Albrecht Kronenberger 2008